# Vort-elementoj

## **bicikl/o** estas vort-elemento **o-ema**

| | |
|---|---|
| **bicikla** vojaĝo | ĝi fariĝis **a-forma** |
| **bicikle** vojaĝi | ĝi fariĝis **e-forma** |
| **bicikli** al kongreso | ĝi fariĝis **i-forma** |

## **varm/a** estas vort-elemento **a-ema**

| | |
|---|---|
| **varme** servita | ĝi fariĝis **e-forma** |
| **varmo** tro alta | ĝi fariĝis **o-forma** |
| **varmas** en Romo | ĝi fariĝis **as-forma** |

## **skrib/i** estas vort-elemento **i-ema**

| | |
|---|---|
| **skriba** demando | ĝi fariĝis **a-forma** |
| **skribe** informiĝi | ĝi fariĝis **e-forma** |
| **skribo** eleganta | ĝi fariĝis **o-forma** |

## **jes** estas vort-elemento **senfinaĵ-ema**

| | |
|---|---|
| **jesa** respondo | ĝi fariĝis **a-forma** |
| **jese** respondi | ĝi fariĝis **e-forma** |
| **jeso** kuraĝa | ĝi fariĝis **o-forma** |
| **jesis** ĉiuj | ĝi fariĝis **is-forma** |